

starto

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



1980·4·(80)

TATRASKLO TATRASKLO

TATRASKLO TATRASKLO

TATRASKLO TATRASKLO

TATRASKLO, trusto de produktantoj de vitro, TRNAVA
FABRIKAS EN JENAJ FABRIKOJ:
Spojené sklárne, n.p.
Lednické Rovne

Stredoslovenské sklárne
n.p. Poltár

Skloplast, n.p. Trnava
Skloobal, n.p. Nemšová

Výskumný a vývojový ústav
sklársky Trenčín

DIVERSSPECIAJN KEMIAJN KAJ IN
DUSTRIAJN KAJ LABORATORIAJN
VITROJN, VITROTUBOJN, VITRAJN
HADENOJN, VITROSTOFOJN KAJ
PLUJAJN PRODUKTOJN.

NI EKSPORTAS EN 57 LANDOJ DE
LA MONDO PERE DE:

OZO Skloexport
PZO Čsl. Keramika
PZO Merkuria
PZO Jablonex
PZO Tuzex
PZO Transakta

KLO TATRASKLO TATRA



65a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO sub Alta protekto de prezidanto de la sveda parlamento s-ro Ingemund Bengtsson okazis en la tagoj 2a - 9a de aŭgusto 1980 en Stockholm.

Sendube ĝi estiĝis denove grandioza travivaĵo por sentas-kaj ĉeestantoj, sed pene laboriga por la organizantoj, same ankaŭ por la komitatanoj de UEA kaj ĝia prezidantaro, kiuj pritraktis en diversaj komisionoj gravajn demandojn, kiuj rilatas la prosperon de UEA, la disvolvon de la movado, taktikon kaj strategion dum ĝia propagando.

La traktadoj komencis jam kelkajn tagojn antaŭ la inaŭguro de la Kongreso. Oni tiel eluzis relativan trankvilon kaj eblecon centrigi la atenton por koncernaj demandoj.

Se mi en nemultaj frazoj pritaksu la rezultojn kaj impresojn de la Kongreso, unusence mi diru, ke ĝi havis trajtojn de granda labordiligenteco, trankvilo kaj organiza precizo.

Novaj pintaj organoj de UEA estis elektitaj, proponoj de la prezidantaro de UEA pri honora membreco akceptitaj /i. a. ankaŭ por s-ano Nikola Aleksiev el Bulgario/, nova prezidantaro kaj prezidantaro elektitaj.

Malgraŭ diversaj antaŭaj atakoj el iuj medioj de la movado, ke UEA perdas sian neŭtralecon aŭ envenis en influon de certa landsfero, tuta kongreso montris la stultecon, tendencemon kaj venenecon de tiuj ĉi malveroj. Ĉiujn traktadojn akompanis zorgoplena celo nur kaj nur apliki la Statuton de UEA kaj laŭ ĝia agadprotokolo doni al nia movado la plej larĝan bazon por esprimi plej diversajn opiniojn. Tio montrigis ankaŭ dum la voĉdonado, el kiu tute demokratece elektigis la nova prezidantaro de UEA:

prezidanto	...Maertens G. /Belgio/	30
vicprezidanto	...Ragnarsson B. /Islando/	
vicprezidanto	...Corsetti R. /Italio/	
ĝen. sekretario	...Flora Szabo-Felső /Hungario/	
komitatano	...Todorov P. /Bulgario/	
komitatano	...Kehlet J. /Belgio/	
komitatano	...Tonkin H. /Usono/	35

Dum la traktadoj ekmembrigis Ĉina Esp. Ligo, kiun reprezentas du voĉoj en UEA-komitato.

El Ĉeĥoslovakio partoprenis ĉiujn komitatkunsidojn tri delegitoj: D-ro J. Jermář, ing. M. Zvara kaj Z. Křimský. Entuta partopreno proks. 1800 homoj, el tio 40 el nia lando. Versimile el soc. landoj nia grupo estis la plej nombra.

Niaj E-aŭtoroj, verkistoj kaj poetoj en literaturaj konkursoj gajnis 4 duajn premiojn. Unu el la gajnintoj estis la prezidanto de nia literatura sekcio poeto J. Karen. La prezidanto

danto de nia medicina sekcio MUDr-o J. Hradil estis honorigita per argenta Memormedalo de UMEA el fonduso de Dr-o H. Shinoda, kiel unu el plej aktivaj medicinistoj en la movado kaj por la preparo kaj publikigo de medicinista terminaro. La Medalo estis al li prijuĝita laŭ la decido de UMEA-komitato.⁵

Mi supozas, ke ĉiuj ĉeestantoj havis profundajn kongresajn impresojn, ligis novajn amikecojn kaj ĉefe spertis, ke ilia laboro ne estas vana, ke la movado akiras ĉiam pli grandan atenton kaj en vasta publiko kaj en sciencaj kaj diplomaciaj rondoj.¹⁰

La Kongreso en Stockholm finis, vivu la 66a Universala Kongreso en Brasilia.

Zd. Křimský

NI ĈEESTIS LA KONGRESON,

jes, la 8-an kongreson de AE-SSR, kiu okazis ekde la 27-30a¹⁵ de junio en Prešov, bela orientalslovaka urbo, riĉa je ĉarmaĵoj, historiaĵoj, vivecaj kaj laboremaj homoj. En Prešov, en kiu vizite estis en 1654 granda humanisto, instruisto de popoloj - Johano Amoso Komenio. En Prešov, kie ekflamis la forta fajro instigita de Granda Oktobra Revolucio - Slovaka²⁰ respubliko de konsilantaroj.

Kongresejo estis en impona halo de Sindikata domo de kulturo en Prešov. Agadon de la kongreso gvidis s-ano Eduard Tvarožek, raporton pri agado de la Asocio prezentis ĝia prezidanto Ing. Milan Zvara. La kongreson ĉeestis kaj ĝin laŭ²⁵ vice salutis delegitaroj de bulgara, hungara, pola, ĉeĥa Asocioj kaj de CL de GDR. La unuan tagon posttagmeze kunsidis komisionoj de la Asocio, inter ili plej amase la porpaca sekcio, kies kunsidon ni ĉeestis kaj partoprenis en diskuto. Vespere nin agrable surprizis ĥoro de infanoj el³⁰ Prešov, kiu kantis slovakaĵajn popolkantojn kaj ĥoro de Alta pedagogia lernejo el pola urbo Bydgoszcz. Tiu ĉi altkvalita ĥoro, kiun ni povos aŭdi septembre en Opava, kantis esperantlingve mezepokajn kantojn de diversaj popoloj, en dua parto alilingve kantojn el 19-a kaj 20-a jarcentoj. Inter³⁵ ili ankaŭ ĉeĥe faman ĥoron el Vendita fianĉino de Bedřich Smetana - Kial kune ni ne ĝoju? - .Ili estis forte aplaŭditaj, same kiel poste kvarmembra /vira kaj virina/ esperantista orkestro, kiu ludis por dancemaj kongresanoj.

Nur malĝoje ni jam ne povis ĉeesti duan tagon de kongresa⁴⁰ traktado, ĉar ni devis forveturi.

Je funkcio de prezidanto de la CK de AE de SSR estis de nove elektita nuna prezidanto Ing. Milan Zvara, je funkcio de prezidanto de Centra kontrolo kaj revizia komisiono⁴⁵ Mi-loslav Rybín

X-a JUBILEA ESP. ĜAKFESTIVALO en České Budějovice

3. - 13. 7. 1980

Signifoplena Esp.ĝakevento, kiu envenis la historion de la movado kaj de Esp.Ĝak-Ligo Internacia speciale, estis okazigo de 10-a JESF sub la protekto de Kulturdomo kaj ties EK⁵ "LA PROGRESO". La festivalo okazis en belaj ejoj de nova konstruaĵo de la Kulturdomo.

Jam laŭ la preparoj oni povis juĝi, ke la evento estos interesa ĉiufanke. Pro enlogigaj malfacilaĵoj oni devis ŝanĝi la daton. Jam komence de julio alvenadis unuaj gastoj, sed la¹⁰ 3-an venis karavano de hungaroj per propra aŭtobuso. Pro pluvo ili alvenis malfrue kaj la inauguro estis farita sen ili. Por turniroj aliĝis entute 50 ludantoj el Belgio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana demokratia respubliko, Hungario kaj Pollando. La festivalon krome partoprenis ankaŭ mul-¹⁵ taj favorantoj de la ludo. La ludantoj kreis 5 grupojn. Por la unuafojo estis aranĝita memstara grupo de ŝakludantinoj.

El kultura programo ni menciis la ekskurson tra historia parto de la urbo, al Hluboká kaj Vyšší Brod, Rožmberk kaj Český Krumlov, dancvesperon kaj filmprezentadon.²⁰

La simulan seancan prezentis ĉs. grandmajstro Vl.Jansa. La diversformajn premiojn post naŭtaga batalado ricevis: D-ro L.Conov, majstro de Bulgario en grupo A. En grupo B K. Krupa, Pollando, en grupo C A.Želiazkov, Bulgario, en grupo D J.Paksi Hungario kaj en virina grupo venkis Petrana Draga-²⁵ nova el Bulgario, kiu atingis kiel unusola 100procentan rezulton. El ĉs.ludantoj estis la plej bona Jan Kišari el Stará Boleslav en grupo A okupinte la kvaran lokon. La grandan fulmrapidmovan turniron venkis juna majstrino de Hungario Zuzana Polgar. La konkurso de ŝakstudoj preparis konata ŝak-³⁰ problemisto Vl.Bunke el Kutná Hora kaj plej sukcesa solvinto estis L.Csako el Kalocsa en Hungario.

La partoprenantoj ricevis altvalorajn rememoraĵojn kaj su-
veniroyjn.³⁵ L. Fiala



JUBILEA KONGRERESO DE BEA

De 12.7. ĝis 14.7.1980 okazis en foira urbo Plovdiv jubi-
lea k v a r d e k a kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio.⁴⁰ Partoprenis ĝin 2200 ĝekongresanoj kaj pli ol 50 estis eks-
terlandanoj. Solena inauguro okazis en foira ekspoziciejo. Laŭ la nombro de partoprenantoj kaj etoso la kongreso plene
similis al UEA-kongresoj. Traktadon sprite gvidis s-anoj Kun
ĉo Valev kaj Violin Oljanov. En la nomo de UEA la kongreson⁴⁵



salutis Dr-ino Flora Szabó Felső. La kongreson salutis ankaŭ la reprezentantoj de Nacia fronto, Junulara asocio kaj Eduka institucio. Krom ĉiuj socialismaj landoj salutis ĝin ankaŭ delegitoj el Belgujo, Svedujo kaj Turkujo. En nomo de I F E F salutis s-ano Joachim Gissner el FRG.

La plej fortan aplaŭdon ricevis delegitoj de Vjetnamia socialisma respubliko pro sia batalema parolado. ĈEA-n reprezentis s-ano Fr. Pisk kaj s-ano D. Kočvara. Post la saluto Fr. Pisk transdonis al honora prezidanto de BEA kaj honora prezidanto de MEM s-ano Nikola Aleksiev honoran membrecon de ĈEA. Nikola Aleksiev estas la unua eksterlandano, kiu ricevas honoran membrecon de ĈEA. La transdono estis akceptita de kongresanoj per entuziasma, tondra aplaŭdo.

Vespere okazis riĉa kultura programo kun danco. Tuta urbo estis ornamita per afiŝoj kaj surskriboj. Ankaŭ en aliaj urboj kaj la ĉefurbo Sofio estis multaj ornamaĵoj sciigantaj al vasta publiko, ke esperantistoj kongresas. Por eksterlandaj gastoj estis preparita vizito de la urbo Péruŝica, kie troviĝas muzeo de revolucia agado de bulgara popolo kaj tragikado de vinprodukta kooperativo. Ĉiutage en loka gazetaro aperis multaj artikoloj pri agado de la kongreso kaj televido abunde informis publikon en vesperaj raportoj.

Dum la kongreso ni akiris novajn spertojn, utilajn por nia laboro. Ni sincere gratulas al bulgaraĵ samideanoj, kies kongreso fariĝis por ni modelo.

Drahomír Kočvara.

TRADICIA LOKO ATMOSFERO

Inter la 13-a kaj 15-a de junio 1980 en Merklín /Ercmontaro - Krušné hory/ apud Karlovy Vary kunvenis pli ol 400 esperantistoj el kvar socialismaj landoj - USSR, Pollando, GDR kaj ĈSSR - por manifesti sian decidigon defendi la pacon kaj en agrabla natura medio kolekti novajn fortojn por plua laboro. La teritorio taugas por tiuj ĉi renkontigoj - tiu ĉi estis jam la tria - ne nur pro sia bela naturo, sed ankaŭ pro la tradicio: ĉi tie ja kunvenadis antaŭ la II-a mondmilito germanaj kaj ĉeĥaj laboristaj esperantistoj manifestantaj sian kontraŭfasisman starpunkton. La renkontigon preparitan de LG ĈEA Karlovy Vary salutis membro de la Centra Komitato de Ukrainia filio de ASE kaj ĝia reprezentanto en la Packonsilantaro en Doneck Nikolaj Starodubcev, reprezentantoj de la Subdistrikta Laborrondo Esperanto de GDR-Kulturligo en Schwarzenberg Rudolf Eichler kaj Philipp Grimm kaj reprezentantino de PEA en Jelenia Góra Teresa Dziedzic.

En la kultura programo preparita kaj gvidata de la reprezentantino de ĈEA en la Packonsilantaro en Karlovy Vary Alena Klementová, la ĉeestantoj aŭskultis vicon da poemoj esprimantaj la plej gravan ideon de nia movado - la pacon.



Poste la ĉeestantoj observis projekciadon de la diapozitivoj - reproduktaĵoj el la libro "Hiroŝima-Nagasaki" kun komentario. La ĉeestantoj subskribis kontraŭmilitan rezolucion. Sabato, la 14-an de junio la ĉeestantoj ĝuis belan naturon kaj eksterordinare belan veteron en du piedmarŝaj ekskursoj preparitaj de fama karlovara turista fakulo Jaroslav Krupka, sekretario de LG ĈEA. Ankaŭ ĉiuj eluzis la eblecon bani sin en la loka naĝejo. En la vespera programo de eksterlandanoj ĉiuj partoprenantoj observis la diapozitivojn el Argentino kaj Brazilo, preparitajn de s-anino Dziedzic.

Dimanĉo la 15-an de junio estis dediĉita al komuna vizito de internacia baneturbo Karlovy Vary. Ĉiĉeronis s-ano Jaroslav Klement, samloka delegito de UEA kaj grupestro de LG ĈEA Karlovy Vary. Post komuna tagmanĝo okazis solena adiaŭo kaj ĉiuj ĉeestantoj estis kore invitataj por la venonta renkontigo en Merklín - 12.-17.06.1981.

Jar. Klement,
grupestro de LG ĈEA
en Karlovy Vary

REZOLUCIO de la 3-a Internacia Turisma Renkontiĝo en Merklín

Ni, partoprenantoj el kvar nacioj signumitaj de la plej terura milito en historio de la homaro, deklaras, ke plej alta valoro kaj espero estas la mondpaco.

Ni kunvenis sur la samaj lokoj, kie jam antaŭ pli ol kvar-⁵ dek jaroj niaj patroj manifestis la internacian solidarecon de proletoj kontraŭ minacanta faŝismo. Same kiel tiam kunigas nin ne nur la Internacia lingvo, sed ankaŭ la strebado por konservi la pacon.

Ĉirkaŭe ni vidas verdajn herbejojn kaj arbarojn, bonodor-¹⁰ antajn florojn kaj brilantan sunon: ni volas, ke ĉio ĉi restu konservita por ĉiuj popoloj de la mondo - ke nenie kaj neniam sur neniu kontinento estu militoj.

Ni scias, ke same kiel guto kun guto finfine kreas maron - eĉ eta amikeco de unuopuloj povas krei grandan kaj senfinan¹⁵ ĉenon de la amikoj en la tutmondo. Tial ni volas daŭrigi la strebado por konservi la mondpacon, disvastigi la internacian lingvon en ĉiuj vicoj de homoj strebantaj por la interkompreniĝo, plifortigi reciprokajn amikajn rilatojn, ligi plu an amikecon kaj tiel vekti la reciprokajn konfidojn inter²⁰ la popoloj.

Antaŭ tridek kvin jaroj finiĝis la dua mondmilito, je kies fino aperis nova minaco por la homaro - la atombombo, kies terurajn efikojn konatigis al ni japanaj esperantistoj en la dokumento "Hiroŝima - Nagasaki". Des pli en la intencoj de²⁵ la ideo de Internacia lingvo ni batalos por la malstreĉiĝo kaj daŭra mondpaco.

Merklín apud K.Vary, la 14-an de junio 1980

Partoprenantoj de la 3-a internacia
renkontiĝo de esperantistoj
/ 48 subskriboj /

30

GEMELIĜO PACOV-PÉCS

De la 3-a ĝis 10a de aŭgusto 1980 okazis en Pacov renkontiĝo de du ĝemelaj rondetoj: de Pécs kaj Pacov. La hungaran grupon gvidis s-ino G. Steurer, kiu estas la animo de la³⁵ Pécs-a Fervojiŝta Esperanto-Fakgrupo. La hungaraj gastoj ĝuis senpagan loĝigon en bele ekipitaj kabanoj de Turisma Organizaĵo en Pacov. La programo estis tre varia. Krom du per-autobusaj ekskursoj al Konopiště - Prago kaj České Budějovice - Hluboká okazis akcepto ĉe la urbestro k-do Josef Kanka,⁴⁰ kiun partoprenis ankaŭ la gvidanto de la urba komitato de la Nacia Fronto k-do K. Šauer kaj la direktoro de la Kultura organizaĵo k-do L. Křížek. La partoprenantoj metis florkronon al la tombo de falintaj herooj dum ambau mondmilitoj kaj la gazetoj sciigis la legantaron pri la renkontiĝo. La res-⁴⁵ tado favoris la vetero, kiu ebligis abundan banadon en proksimaj fiŝlagoj kaj kantadon ĉe pluraj tendarfajroj. Ĉe la unua tendarfajro regalis siajn amikojn Pacov-aj esperantis-

toj, ĉe la lasta preparis gastigadon la hungaroj. Da vino kaj sendviĉoj estis abundo. Kaj ĉion tion aranĝis malmultnombra E.-grupo en Pacov, lerte gvidata de la oferema s-ano L. Pracheř. Miaj travivaĵoj kaj rememoroj pri ĉi tiu renkontiĝo restos neforgeseblaj.

Milada Josková, Prago

GRATULON en TOKION...



Pluraj niaj esperantistoj posedas en sia biblioteko kiel raraĵoj japanlingvaj librojn, kiujn ili ricevis de konata tradukisto kaj kultura agemulo el Tokio - samideano Kei Kurisu. La por ni preskaŭ unikaj ekzempleroj plej ofte apartenas al literatura trezoro de la ĉeĥa kaj slovaka literatur-¹⁰ roj, ĉar ilin en la japanan tradukis s-ano Kurisu, ĉu el E-o aŭ rekte el la origina lingvo. Vere, ĉe la komenco de lia tradukarto staris Esperanto, kiun li uzis kiel pontlingvon.¹⁵ Sed ankaŭ kiam li ekstudis la ĉeĥan lingvon kaj kapablis tradukadi jam rekte el la originalaĵoj, li ofte uzis Esperanton kiel helplingvon por precizigi sian esprimstilon. Tiel japane aperis "La muta barikado" de J. Drda, "Riporto skribita en la pendumila maŝo" de J. Fučík, "Rakontoj el la unua²⁰ poŝto" kaj "R.U.R." de K. Čapek, "La avineto" de B. Němcová, "La brava soldato Ŝvejk" de J. Hašek kaj pluraj libroj, rakontoj kaj aliaj literaturaĵoj. Meritoj de s-ano K. Kurisu por disvastigo de la ĉeĥa kaj slovaka literaturoj en Japanio estas neaprezeblaj.²⁵

La 18-an de julio ĉijare li ĝisvivis sian sepdekjariĝon... Daŭre aktive li interesigas pri nia literaturo, kun scienca erudicio li studas la vivon kaj verkon de J. Fučík, kiun li profunde admiras. Krom la literatura kampo li ankaŭ tre vigle laboras en la movado ekde sia esperantiĝo en 1930. Ĉiam³⁰ li funkciulis en la progresema Esp. movado, kio en lia lando kaŭzis oftajn punrestadojn. S-ano Kurisu restis plena de laborelano kaj nelacigebleco, pri kiuj niaj esperantistoj konvinkiĝis dum lia dujara restado en ĈSSR en la jaroj 1959 - 1961, kiam li prelegis la japanan lingvon en la Karola Uni-³⁵ versitato.

Okaze de lia vivjubileo ni sendas al nia granda amiko koraĵn gratulojn kaj bondezirojn!

V. Kočvara

Demonstra propagando apartenas al la plej efikaj rimedoj de la politika propagando. Kiam nia socio decidiĝis por socialisma vojo, necesis ofte - eĉ ĉiutage - klarigi celojn kaj avantaĝojn de socialismo al ĉiu el niaj loĝantoj, laboruloj. Kaj ne ĉiam ni havis tiom da eblecoj efektiviĝi la propagandon: ekz. en la vilaĝoj nur instruistoj kaj klerigaj oficistoj fakte fabrikis ĝin - propagandajn kestojn, afiŝojn, panelojn ktp. Ne ĉiam estis klara ĝia enhavo: ne sufiĉis sloganoj, devizoj, bildoj... Ni lernis dum jardekoj - kaj ni ellernis, ke nia demonstra propagando devas prezenti faktojn, specialajn kaj interesajn veraĵojn - informojn. Tio speciale validas en la Esperanto-propagando: ne sufiĉas sole sloganoj, devizoj, steloj kaj standardoj.

Fine de la 79-a jaro estis limigitaj supozataj elspezoj por la propagando en ĉiuj ĉeĥoslovakaj entreprenoj, inkluzive sociajn organizaĵojn. Ĉu ĝi signifas, ke ni tute forlasos la propagandon? Jes - sed ni forlasu antaŭ ĉio la superfluan propagandon! Ni forlasu verson 20 sloganojn - kaj anstataŭigu ilin per efika propagando de faktoj. Ni ne trudu al la publiko sencelajn devizojn, sed informu ĝin pri nia agado por paco, socialisma konstruado, klerigo kaj interkomprenigo.

Ĉi estas esenco de la Regularo de Frostavallen el la j. 1956: ne propagandi, sed informi. La serioza informado pri la agado de esperantistoj devas esti enhavo de niaj propagandaj kestoj.

Limigo de la elspezoj por propagando ne povas esti instigo por limigo de nia propaganda laboro. Okazis, ke unu klubo antaŭ nelonge festis sian 75-jaran jubileon. Sur la domo, kie iam loĝis unu el la plej elstaraj iniciatintoj de MEM, ĝis nun pendas esperantista propaganda kesto - ĝis 1973 unu el la plej bele aranĝitaj en la tuta urbo. Sed dum la festotagoj en junio 1980 ĝi enhavis malnovajn polvumitajn propagandajn; ĝia vitro estis malpura - kaj preterpasadis ĝin vizitantoj de unu el la tutŝtataj ekspozicioj. La ekspoziciejo estas lokita rekte kontraŭ tiu ĉi domo. Ĉu tiel volas niaj samideanoj demonstri publike la limigon de siaj propagandaj elspezoj?!

Metodika-propaganda komisiono anoncis komence de nia jubilea jaro - 35-jariĝo de la liberigo de Ĉeĥoslovakio - la tutŝtatan konkurson de la esperantistaj propagandaj kestoj. Ĉis la prokrastita limdato /la 30-an de junio 1980/ partoprenis ĝin sole tri niaj kluboj! Kaj oni ne povas aserti, ke la komisiono aŭ la sekretario de ĈEAR helpas al la kluboj tiucele. La kluboj - bonvolu vekigi!

Jaroslav Kliment,
estro de MPK ĈEA

Lingva angulo

KIOMA HORO ESTAS - 3.15 aŭ 3.45?

Bernard Golden

Kiom da esperantistoj scias ĝuste kaj neambigue respondi? Ne ĉiuj, eĉ konataj instruantoj kaj verkintoj de lemolibro! Estas tri manieroj diri la tempopunkton en Esperanto.

- Uzo de "kaj"
Tiu ĉi maniero estas la plej simpla kaj neniam kaŭzas erarojn.
3.15 = la tria kaj dek kvin /minutoj/
la tria kaj kvarono /de horo/
3.45 = la tria kaj kvardek kvin /minutoj/
la tria kaj tri kvaronoj /de horo/
- Uzo de "post"
La deirpunkto estas la sama, la komenciĝo de la horo, post kiu oni nombras minutojn aŭ onojn de horo.
3.15 = dek kvin /minutoj/ post la tria kvarono /de horo/ post la tria
3.45 = kvardek kvin /minutoj/ post la tria tri kvaronoj /de horo/ post la tria
- Uzo de "antaŭ"
Se oni uzas la prepozicion "antaŭ", estas necese ŝanĝi la deirpunkton por nombrado; ĝi fariĝas la komenciĝo de la venonta horo, la kvara.
3.15 = kvardek kvin /minutoj/ antaŭ la kvara tri kvaronoj /de horo/ antaŭ la kvara
3.45 = dek kvin /minutoj/ antaŭ la kvara kvarono /de horo/ antaŭ la kvara

Nun ni trovos la tuberon en la afero. En la Esperanto de kelkaj landoj, estas kutimo uzi la prepozicion "de" kun la senco de "antaŭ" en tempesprimoj de grupo "3" ĉi-supre. Jen ekzemploj de la uzado fare de parolantoj de la hungara lingvo.

En la plej freŝdata lernilo eldonita en Hungario, 30 nap alatt eszperantóul de Jozsef Horváth, troviĝas jenaj esprimoj sur p. 36.

- 5.30 = duono post la kvina
duono de la sesa
duono antaŭ la sesa
5.45 = tri kvaronoj post la kvina
tri kvaronoj de la sesa

Ĉar "duono de la sesa" kaj "duono antaŭ la sesa" esprimas la saman tempopunkton, 5.30, estas evidente, ke la aŭtoro egaligas la prepoziciojn "de" kaj "antaŭ". Oni faras gravan

eraron, se oni interpretas "tri kvaronoj de la sesa" sammaniere, tio estas kiel "tri kvaronoj antaŭ la sesa". Kiel ni jam vidis, tiu horo estas 5.15, ne 5.45!

Ankoraŭ unu ekzemplo, kiu reliefigas tiun ĉi konfuzon, venas de la malnova lernolibro de Julio Baghy, Eszperanto 5
Nyelvkönyv. Sur p. 71 oni povas legi la sekvajn esprimojn.

2.15 = la dua kaj dekkvin m-oj
kvarono post la dua
kvarono de /antaŭ/ la tria

2.45 = la dua kaj kvardekkvin
tri kvaronoj post la dua
tri kvaronoj de /antaŭ/ la tria

Ankaŭ tiu ĉi aŭtoro funkciigas "de" kaj "antaŭ" sammaniere, sed logike, kvaronhoro antaŭ la tria estas 2.45 kaj tri kvaronhoroj antaŭ la tria estas 2.15 — tute inverse!

La kialo de tiuj ĉi eraroj estas la rezulto de imitado de la hungara esprimmaniero en Esperanto. Temas, do, pri hungarismo. En kelkaj hungaraj tempesprimoj, la deirpunkto estas la komenciĝo de la venonta horo kaj ne la komenciĝo de la nuna horo, kaj oni indikas, kiom da tempo forpasis antaŭ tiu horo. Tiu pensmaniero estas fremda al aliaj popoloj kaj ankaŭ al Esperanto.

Ne ĉiuj parolantoj de la hungara lingvo lasas sin influi de la gepatra lingvo. La lernolibroj de István Szerdahelyi, Eszperanto Nyelvkönyv /du volumoj/ kaj la gramatiko de Kolomano Kalocsay, Rendszerezés Eszperantó, enhavas modelajn frazojn, kiuj ne misgvidas lernantojn.

Cetere, Plena Gramatiko en §87 rimarkas jene: "Ne uzu la germanan dirmanieron /dek minutoj de la kvara = 3h 10/ pro ĝia konfuziveco". Oni, do, devas zorgi pri la gusta esprimo de tempopunktoj en Esperanto. Kvankam la risortoj kaj radetaro de niaj horloĝoj funkciigas ilin preskaŭ perfekte, la homa menso ofte postrestas kaj paneas pro nacilingvaj perturboj.

Aprilo 1980

- x -

ĈU ESPERANTIGI PERSONAJN NOMOJN ?

En Starto n-ro 3/1980 diras s-ano Slenina /p.20/: "Eĉ ĉe la personaj nomoj estas dubinde uzi fonetikan transskribon, ekzemple Shakespeare - Sekspir."

El vidpunkto de naciaj, uzantaj en sia gepatra lingvo la latinan alfabeton, povas tiuĉi sinteno ŝajni gusta. Sed ni pensu pri tiuj, kiuj uzas alian skribon - rusoj, ukrainanoj, belorusoj, macedonoj, serboj, bulgaroj, grekoj kaj multaj aliaj naciaj, kiuj scias E-on, sed ne la lingvojn anglan, francan, germanan, italian ktp. En siaj naciaj lingvoj ili uzas pli-malpli fonetikan transskribon de nomoj kiaj Shakespeare, Goethe, Schiller, Boccaccio, Hugo ks., tiri ili ne scias la nacilingvajn formojn. Certe do estas por ili pli

proksimaj la formoj Sekspiro, Goeto, Sillero /ĉiuj laŭ PIV/, Bokaĉo ol la formoj originaj. La nomon Hugo PIV ne ŝanĝas, eble tiel, ke la transskribo Igo faras la nomon nerekoniebla. Anstataŭ Goeto eble pli konvenus Ceteo respektante la prononcon. Sed ĉio dependas de la konvencio.

Tial mi pensas, ke en la E-aj publikaĵoj estas ĉiam klariĝoj uzantaj, t.e. oni indiku E-an formon aŭ prononcon ĉe la originala nomo kaj male.

Transskribado de nelatinliteraj nomoj en la latinliterajn lingvojn estus alia ĉapitro /ekz. ĉefe oni skribas Mao Ce - tung, sed la ĉinoj transskribas E-e Maŭ Ze-dong/.

Fine ni ne forgesu, ke ankaŭ el la origina formo Samenhof fariĝis Zamenhof.

Adolf Staŭra,
estro de Lingva komisiono de ĈEA

ANGLA MALSANO FUŝAS NIAN ESPERANTON

Estas tute nature, ke Esperanto enkondukas el la angla modernajn vortojn kiel ekz. ĵazo, ĵipo, ĵinzo k.a. kun ioma ortografia ŝanĝo konforme laŭ la postuloj de la strukturo de Esperanto. Kiam oni neglektas la principojn de Esperanto kiel "kunmeta" lingvo /aglutineco/, aŭ kiam oni volas anstataŭi jam kutimajn vortojn per pli "fajnaj" angladevenaj vortoj, oni misvojas ĝisrande de pereco. Ni analizu kelkajn kazojn:

1/ Fuelo /fuel/ = brulaĵo /"fuelo" estas nura kodo, ne nion diranta pri sia funkcio, dum "brulaĵo" estas regule formita, sufiĉe mallonga kaj bela vorto, diranta esencon pri sia funkcio, tute sendepende ĉu temas pri ligno, karbo, benzino, nafto, uranio, kvankam en la lasta kazo okazas ne vera "brulado", sed ĉenreakcio, tamen la sama vorto pro analogio estas uzenda, ankaŭ pro lingva ekonomio./

2/ Komikso /comics/ = bildrakonto /se bildrakonto" estas tro ĝenerala, oni povas laubezone pliprecizigi ekz. komika bildaro, aventura bildaro, fabela bildaro ktp./

3/ Jaketo /jacket/ = diskokoverto /"koverto" ŝirmas leteron, analoge ĝi ŝirmas ankaŭ diskon. En la diskokoverto eĝas ankaŭ alia "ŝirmilo", tiun ni povas nomi "ŝirmpapero" aŭ ŝirmplasto" konforme laŭ la uzita materialo./

4/ Riporto /report/ = raportaĵo /la esperanta vortfarado ne estas mekanike matematika, do "raportaĵo" ne estas nur iu "raporta konkretaĵo", sed ĝi plene redonas la sencon de internacia "reportage". Same anstataŭ "reportero" ni uzu simple "raportajisto" /"raportisto" povus esti ankaŭ uzata, sed ne redonas bezonatan sencon sufiĉe klare, ĉar ĝi havas sian propran sencon ekz. raportisto de scienca societo./

5/ Mitingo /meeting/ = /politika/ amaskunveno /Ni ne kodigu nian lingvon per "mitingo"-specaj vortoj, sed laubezone ni pliprecizigu per aldonaj epitetoj por trafi la sencon. Al mi la vorto "amaskunveno" estas tute natura kaj memkomprenebla vorto, dum "mitingo" estas abradakabro./

Ni ne dorlotu Esperanton per falsaj, malpropraj elementoj, ĉar tio estas "ursa" servo por nia lingvo kaj la tuta afero de internacia lingvo. Esperanto vivu per si mem!

J. Jäntti, Finnlando

el leterkesto


ĈOM PRI LA HISTORIO KAJ NUNA STATO DE ESPERANTO - AGADO en VLADIVOSTOK

Kun ĝojo ni informas la esperantistaron de cetera mondo, ke nia movado nun denove ankaŭ ĝermas en belega havenurbo Vladivostok. Ni povas konstati, ke siatempe ĉi tie viglis E-agado. Temas pri la komenco de la 20-a jarcento. Tiam lau certaj indikoj en la urbo aktivis E-societo, kiun estris F. Postnikov. Li komisiis al s-ro Futabatei Simej /la konata japana verkisto - literaturkritikisto/ tradukon de la lernolibro de Zamenhof en la japanan lingvon. Dank' al rimarkinda tradukado far' de Futabatei la japana esperantistaro akiris bonegan lernolibron de la Internacia lingvo.

En 1918 la regiona presorgano Krasnoje znamja /Ruĝa standardo/ aperigis la artikolon "Esperanto kaj Internaciano", kiun aŭtoris J.Kokuŝkin.

La urba esperantistaro gastigis en 1921 la faman blindan esperantiston V.Jeroŝenko. Postaj spuroj de aktivado de la E-societo mankas. Eble neniuj el tiamaĵ e-stoj ĝisvivis kiam en la urbo renaskiĝis E-agado en 1979.

Mi konfesas, ke la renaskiĝo estis ege malfacila, ĉar krom mi neniuj plia entuziasmo anoncis sin por kunlabori dum kreado de la E-sekcio ĉe Ekstrem-Orienta Ŝtata universitato, kie nun aktivas plue la malgranda E-klubo, vera heredanto de la E-movado.



Kiel ĉiam, komenco neniam estas facila, sed la sekcio digne transvivis ĉiujn malfavorojn kaj malagrablaĵojn iom post iom transformiĝinte en la klubon. Nun ĝi nombras ĉirkaŭ 30 personojn, ne nur la urbanojn, sed ankaŭ loĝantojn el la tuta Regiono Apudmara, kiun Vladivostok eniras. Certe ni havas ankaŭ sufiĉe da problemoj, sed ni forte kredas, ke kun helpo de la tutmonda esperantistaro kaj unuavice helpe de enlanda movado frunte kun ASE ni prosperos.

S. Anikejev,estro de Vladivostoka E-klubo

Nia adreso: 690652 VLADIVOSTOK, Uboreviĉa str.25, UNIVERSITATO
Orienta Fakultato, E - klubo, Soveta Unio

DISKOKLUBO "ESPERANTO" en Samarkando

La novfondita diskoklubo "Esperanto" ĉe la Samarkanda urba komitato de komsomolo turnas sin al ĉiuj Esperanto - grupoj kaj apartaj personoj, kiuj povas peri amikajn kontaktojn kaj kunlaboron kun similaj junularaj diskokluboj alilande aŭ helpe per spertinterŝanĝo, konsiloj, programoj de diskovesperoj, revuoj, fotoj, afiŝoj, lumbildoj, sondiskoj ktp.

La estraro de la diskoklubo garantias laudeziran rekompencojn al ĉiu helponto /albumoj, lumbildoj, sondiskoj, libroj, bildkartoj, memoraĵoj ktp./.

Oni korespondas en diversaj lingvoj /Esperanto, la rusa, angla, germana, franca k.a./. Bonvolu adresi ĉion al:
Samarkandskij gorkom LKSM Uzbekistana, Diskoklub "Esperanto" SU - 703000 Samarkando, ul.Vojkova 3
Uzbekistano USSR

Karaj ĝesamideanoj! Via helpo, kiun ni varme antaŭdankas, ne nur kontribuos al la sukcesigo de niaj diskovesperoj, sed samtempe plipopulgrigos Esperanton en nia urbo.

Propagandu ankaŭ nacilingve! Bv.aperigi la ĉi-supran alvokon en vialanda junulara gazetaro.

Ŭryvek z dopisu Jozefíny Petrové z Černína /25.5.1980/:

...Chtěla bych poděkovat MUDr.Hradilovi a celému EK v Mnichově Hradišti za hezké chvíle ve dnech 16.-18.5.u nich.

Protože jsem začátečnicí, bylo pro mne toto setkání vstupem mezi esperantisty, vstupem velmi milým. Byla jsem překvapena velkou péčí pořadatelů a snahou lektorů naučit nás - metodou za těch pár hodin co nejvíce.

Kulturní program Evy Seemannové vysoké hodnoty i výlet do Českého ráje - to byly krásné a nezapomenutelné doplňky bohatého programu.

Kaj la fragmento el la letero de EG JKP en Hořice v P.i

Niaj du aninoj s-anino Bouchnerová kaj Petrová partoprenis la renkontigon en Mnichovo Hradiště...Reportante pri ĝi ili tre laŭdis la tutan programon. Speciale ili admiris la agreblan atmosferon kaj organizkapablojn de lokaj samideanoj sub gvido de D-ro Hradil.

Letero el duoninsulo Kamčatka.

Antaŭ ĉio alia necesas, ke ni prezentu nin. Do, salutas vin, karaj legantoj de STARTO, geesperantistoj el urbo Petropavlovsk - Kamčatskij, situanta en ekstrem-orienta parto de Soveta Unio. Nia Esperanto-klubo de internacia amikeco agadas en la urba kulturdomo de fiŝkaptistoj.

Per tiu ĉi letero ni dankas al niaj korespondamikoj el Ĉeĥoslovakio, de kiuj ni ricevis por la klubo ses ĵurnalmaterialojn pri la agado en via lando. Ili estis publikigitaj en nordmoravia "Nová svoboda" /Svobodil bez tlumočníků, Zasedání esperantistů, Kroužek esperanta/, en "Ostravský večerník" /Kluby esperantistů/, en "Plamen" /Esperanto pro děti/ ktp.

Ni gojas pro viaj sukcesoj kaj deziras al vi, ke ili ĉiam akompanu vin!

/sekvas pluraj subskriboj de membroj de la EK de IA/ La poŝta adreso: Sovetunio, 683024, urbo Petropavlovsk - Kamčatskij, bulvar Ribackoj Slavi 3-10, Andris Natinj/por Esperanto - klubo/.

ni recenzas

PANORAMA RIGARDO SUPER LA ESPERANTA LITERATURO

de Marinko Ĝivoje
Eldonis Internacia Kultura Servo Zagreb 1979. Eldonkvanto 1000 ekz., ofsete presita, formato 15 x 20 cm, 281 paĝoj, kartonita, prezo ne indikita. Marinko Ĝivoje prezentas valoran supervidon de Esp.literaturo originala kaj traduka ekde 1887 ĝis 1978. En la antaŭparolo kaj studaj artikoloj li koncedas, ke lia aprezo de verko ne povas en sia amplekso listi ĉiujn nemalgravaĵojn kaj citindaĵojn verkojn kaj aŭtorojn, sed malgraŭ tio la libro liveras al ĉiu serioza esperantisto kaj precipe por submetigintoj al superaj ekzamenoj tre riĉan studmaterialon. La aŭtoro dividas la Esperantan literaturon, laŭ unu el pluraj ebloj, en tri periodojn: la unua ĝis la Unua mondmilito, la dua ĝis la Dua mondmilito, la tria post la Dua mondmilito. Ĉe la plej gravaj aŭtoroj li sekvigas post prezento de l' aŭtoro kaj listigo de liaj verkoj ankaŭ specimenaĵojn montrojn el liaj verkoj versaj aŭ prozaj. Por faciligi serĉadon en la tekstoj la nomoj de la aŭtoroj kaj tradukintoj estas laŭinde presitaj majuskle kaj substrekitaj kaj la verkitoloj estas substrekitaj. La supervidon helpas indeksoj de la ĉerpita literaturo /16 verkoj/ Kroniko laŭjare de 1859 ĝis 1978 kun naskiĝ- kaj mortdatoj de plej gravaj Esp. literaturistoj kaj aperjaroj de gravaj verkoj, kaj indekso de personoj kaj temoj.

Eble kelkiu bedaŭros ne trovante tiun aŭ iun aŭtoron aŭ verkon, same kiel mi ne trovis mension pri pluraj ĉefaj eldonaĵoj /ekz. de Arne Novák "Ĉeĥa literaturo el birdperspektivo", Jan Vrba "Homo de Dio", Nesvadba "Perdita vizago",

"Benedek" k.a./.. Sed pri tio la aŭtoro jam anticipas atentigas. Ankaŭ la riĉa, centojn da tradukoj nombranta majstra poezia kaj proza rikolto de Miloš Lukáš, Tomáš Pumpr, Rudolf Hromada, St. Kamaryt estas relative magre menciita. Jindřich Ježek /Erinaco/ tute elfalis. Kompense aliaj aŭtoroj estas pli malavare prezentitaj. Sed spite ĉion ĉi la verko prezentas imponan panoramon. La lingva flanko de la verko estas bonega, kiel oni ja povas atendi de nia elstara lingva erudito kaj fama verkisto.

Por pliiĝustigo en event. kaj dezirinda reeldono mi citas kelkajn malmultajn preserarojn kaj lingvajn korektindaĵojn /paĝo/linio desupre/ 14/7 sovjeta - soveta, 36/27 inter alie - interalie, 69/10 50 jaroj - 50 jarojn, 121/23 ŝturmante - ŝturmante, 181/2 manko da - manko de, 190/26 32 ilies - ilia aŭ ties, 196/30 mondmilito - mondmilito, 209/2 strasto - strato, 217/32 pero - opero, 225/30 Killian - Kilian, 250/28 "Mi-ster Tot aĉetas mil okulojn" de L. Tarkony - de J. Fethke, Malkorektaĵoj en la gitaĵoj estas supezeble preseraroj aŭ pekoj de koncernaj aŭtoroj: 25/6 dronita - droninta, 153/13 turnadas - turnigadas, 156/26 senbenda - sonbenda.

Kvankam la aŭtoro de PIV en tiu verko "pro presa oportuno" kaj "...kutimo de Zamenhof..." ekuzis ree komencajn majusklojn ĉe la popolnomoj, mi opinias preferinda sekvi la Plean Gramatikon kaj la nuntempan preskaŭ ĝeneralan uzadon kaj skribi la popolnomojn minuskle. Ankaŭ du paralele uzitajn formojn ukraina kaj ukraina mi rekomendus unueciigi je unu el ili.

Dum tralego de tia ĉi verko samkiel ĉe tralego de verkegoj "Enciklopedio de Esperanto" kaj "Esperanto en Perspektivo" trudiĝas al oni ideo kiom da laboro, sindono kaj entuziasmo estas dum la 90 jaroj en Esperanto investita. Ĝi reprezentas enorman kapitalon!

Resume, tiu ĉi verko meritas altan aprezon kaj mi rekomendas ĝin varme al ĉiu interesito.

Jiří Kořínek

HISTORIO DE ESPERANTO. Skizo kompilita de d-ro Karl Beckmann. Eldonis Austria Esperanto-Instituto, Vieno. 11 paĝoj, 21 x 15 cm, prezo 9 austr. ŝil.

La aŭtoro estas prezidanto de la Aŭstria E-ista Federacio kaj direktoro de la Austria E-Instituto. Lia skizo komencigas en antikvaj tempoj. Li mencias la tiamaĵojn kaj pli postajn manierojn, per kiaj oni solvis la lingvan problemon en internaciaj kontaktoj. Li skribas ankaŭ pri malnovaj provoj, krei arte novan lingvon, kaj indikas unualoke nian J. A. Komenský-Comenius. Unufoje mi legas ĉi tie pri "Universalglot" de iu Pirro /1868/ kun tekstospecimeno: "Men senior! I sende evos un gramatik e un verb-bibel de un nuovo glot nomed Universalglot".

La historio de la E-movado estas ĝisdata, sed ĝi pritraktas nur la eŭropan movadon sen detaloj pri naciaj organizoj ka. Tial la faktoj far la aŭtoro prezentitaj bezonas kompletigon, iam ankaŭ korekton.

Ekzemple estas menciita la artikolo de Tolstoj, kies apero en La Esperantisto en 1895 kaŭzis pereon de tiu ĉi unua E-gazeto. Konvenus menci i la moralan apogon, kiun donis Tolstoj al la E-afero.

La aŭtoro indikas ciferojn pri Universalaj Kongresoj. Laŭ la UEA-Jarlibro kaj Enciklopedio oni povas facile konstati, ke li iom troigas rilate la nombrojn da partoprenantoj kaj reprezentataj nacioj. Male, ĉe la UK en Praha li indikas 2200 personojn anstataŭ 2561.

Zamenhof paroladis inaŭgure nur ĉe ok unuaj UK.

La Ido-krizo komenciĝis antaŭ fino de oktobro 1907 kaj en 1908 ĝi plej skuadis la movadon - la aŭtoro mencias nur la jaron 1908. Mankas nomo de la vera aŭtoro de tiu ĉi "reformo" - Louis Couturat, kiel pruvis Waringhien en Leteroj de Zamenhof.

Antaŭ la Dua mondmilito fidiis la britaj samideanoj Internacian Esperanto-Ligon kaj gazeton Internacia Esperanto-Revuo, antaŭvicante proksimiĝantan katastrofan eŭropan konflikton; la celo estis, ebligi internaciajn kontaktojn, se agado de la en Svislando ekzistanta UEA estus malhelpata. Post la milito, UEA kaj IEL kunfandiĝis.

Tekste estas prisilentita la nomo de eminentulo, kiu forlasis UEA en Hamburgo en 1974 kaj fondis novan internacian spiton-organizon.

Ekzistas ankoraŭ kelkaj aliaj neperfektaĵoj.

La aŭtoro dediĉas atenton ankaŭ al la laborista movado.

Pri la kaŭzoj, kial E-movado ne sufiĉe prosperas en la "okcidentaj" landoj, la aŭtoro diras interalie: "...la materialismo de la nuna - precipe okcidenta - junularo, kiu postulas ĉe ĉiu ekpeno tujan monan gajnon - kian Esperanto dum ankoraŭ kelka tempo ne povas alporti". Pri aliaj kaŭzoj kulpas, laŭ d-ro Beckmann, la televido, antaŭjuĝoj kontraŭ E, nesufiĉa ebleco veturi kaj pagi el la socialismaj landoj okcidenten, kaj cenzuro de internaciaj korespondaĵoj. La ekonomian krizon en la okcidento li ne mencias.

En la teksto troviĝas pluraj lingvaj eraroj, precipe neĝusta uzado de -ata, -ita.


La tekston, tradukitan en nacian lingvon kaj konvene adaptitan, oni povas uzi por publika varba prelego.

La papero estas bona, teksto klare presita, minimumo da preseraroj.

Adolf Staňura

DOKTORO BOVORO de A. Lopez Luna. Humuraĵo sur 102 paĝoj, formato 11 x 17 cm, multobligita, broŝurita, prezo 1 us.dolaro. Eldonis Amigos de Lopez Luna, Buenos Aires.

Jen groteskaĵo, kiu intencas karikaturi kaj pilori burĝan feblamensan rengostreban karieron, kiun la burĝa socio helpas avanci ĝis la plej alta socia rango en ia fikcia lando Tarsio. Kvankam pluraj ideoj de l' verketo estas trafaj



HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon - kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas: la kompleksan kuracadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

ĈEĤOSLOVAKAJ BANLOKOJ
- oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro -


KARLOVY VARY
FRANTIŠKOVY LÁZNĚ
MARIÁNSKÉ LÁZNĚ
JÁCHYMOV
TEPLICE V ČECHÁCH
PODĚBRADY
JÁNSKÉ LÁZNĚ - TŘEBŮŇ
JESENÍK - LUHAČOVICE
TEPLICE NAD BEČVOU
o o o o o o o o o o o

BALNEA

Reprezentanto
de ĉeĥoslovakaj
banlokoj
kaj kurac-fontoj,
Pařížská třída 11,
110 01 PRAHA 1

ĈEĤOSLOVAKIO
Tx: 122 215






1



2



3




4



5



7



9



11



12



13



14

KION ĈIU NE VIDIS DUM KONGRESO - KION ĈIU NE VIDIS DUM KONGRESO - KION

1. KONGRESO ESTAS NIA
2. DIPLOMATOJ? DIPLOMATOJ!
3. JUNA GWARDIO
4. VIDU, SOVETANOJ PARTO-PRENAS
5. VITRA MONUMENTO EN LA URBOCENTRO
6. MALNOVA URBO
7. KONGRESHALO ANTAŬ ĈEFA ATAKO DE KONGRESANOJ SED POSTE TIO ESTIS BRUO



8

8. MIGRANTA REKLAMO PRI TAGMANĜO
9. KOMERCA CENTRO
10. VIDU KIA ANKAŬ ESTAS LA PROHIBICIA STOKHOLMO, TUJ APUD LA REĜPALACO
11. RIDETO POR KAMERO ...?
12. DO, NUN MI NE SCIAS, AĈETI AŬ NE AĈETI ...?
13. SVEDAJ SOLDATOJ
14. ANKAŬ MUZIKISTOJ /Ofte vidataj studentoj en melnova urbo, metro/

10



kaj supozigas, ke tiaj malpli troigitaj figuroj en la socio ie hantas, kvankam la aŭtoro volas meti spegulon al la et-burĝa socio, la verketo impresas kiel iom naiŭa senpretenda legaĵo en 115/!!/ ĉapitroj. Ĉi eble povus taŭgi kiel kurs-legaĵo, se - se ĝin ne makulus sur la 102 etformataj paĝoj 5 185 gramatikaj eraroj, kiajn mi ne pardonus eĉ al miaj kursanoj - komencantoj. Preseraroj enestas nur 13. Krome oni devas al la stilo esti tre indulgema. Kial iuj aŭtoroj ek-verkas antaŭ ol ellerni la lingvon? Ĉu ili aŭdacus tion fari en sia gepatra lingvo? 10

Jiří Kořínek

Systemübersicht der Anpassung der Deutschen Stenografie an die internationale Sprache "Esperanto" /nova sistemo de Esp. Stenografio/, fotoprese eldonis en 1979 Societo por Stenografio kaj Maŝinskribado en GDR /DDR - 1054 BERLIN, Mulack-str.30/, 12 paĝoj, formato 15 x 21 cm. 15
La aŭtoro Otto Müller sukcese klarigas kaj en pluraj konvenaj ekzemploj bonege montras ĉiuspeciajn uzon kaj aplikadon de germana stenografio en la Internacia lingvo. Interesuloj mendu la broŝuron laŭ la indikita adreso. 20

-jelĉ-

Peter Altenberg : SKIZOJ. Tradukis Grete Breunlich. Eldonis Austria Esperanto-Instituto, Vieno, 1980. 32 paĝoj, 21 x 13 cm.

Peter Altenberg estas pseŭdonimo de Richard Engländer kaj li vivis 1859-1919 preskaŭ ĉiam en Vieno. La tradukintino diras, ke li estis alttalenta, sed netaŭga por regula laboro, li devis unue ripeti la abiturientan ekzamenon, poste frue fini la ĵursciepcan kaj medicinan studadon kaj librokomercestan oficon. Laŭ konsilo de kuracisto, la patro lasis lin vivi libere, por "kreskigi lian animon." Tiel li fariĝis poeto, sed la prezentitaj 33 mallongaj pecoj estas prozaĵoj pri okazintaĵoj en lia infanaĝo kaj pri diversaj aliaj ĉiutagaĵoj. Iujn pecojn oni povus taksi kiel prozajn poemojn, la aliaj estas humuraj, kortuŝaj aŭ konsternaj epizodoj. 35

En la libro oni trovas germanajn nomojn de ĉefaj montoj kaj urboj: Reichenau - Rychnov, Schneeberg - Sněžník, Karlsbad - Karlovy Vary, Marienbad - Mariánské Lázně, Franzensbad - Františkovy Lázně.

La lingvaĵo ne estas senmanka kaj enestas pluraj preseraroj. La papero estas bona, etaj litertipoj. Adolf Staňura. 40

LA VERO PRI LA VJETNAM-ĈINAJ RILATOJ DUM TRIDEK LASTAJ JAROJ
Eldonis Fremdlingva Eldonejo Hanojo 1980. 110 paĝoj 19 x 13 cm. Ilustrita. 45

